



LA DEKSEPA



Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVII^e Arr^t
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVII^e Arrondissement

Réunions amicales tous les Mercredis soirs à 9 heures,
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Notre Diner mensuel.

Le prochains Diners mensuels de la Section auront lieu
les Mercredis 1^{er} Mars 1911 et 5 Avril prochain, au « Café
de la Gare », 6, place Pereire, à 8 heures du soir très pré-
cises. — Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

Conférences

faites au siège même de la Section, 6, Place Pereire.

- 1^{er} Mars. — M. Grosset : Pri insektoj kaj bestoj (kun lumbildoj).
- 8 Mars. — Mlle Talvat : Pri la modo ĉe la Parizanino.
- 15 Mars. — M. Solsona : Sentema paroladeto.
- 22 Mars. — M. Sprotté : Miaj ideoj kaj projektoj pri la propagando de Esperanto en orientaj landoj.
- 29 Mars. — M. Wynshenk : Pri Nederlando (kun lumbildoj).
- 5 Avril. — M. Kolowrat : Pri Montenegro (kun lumbildoj).

HUMORAĴOJ

Kampulo, venante la unuan fojon al Parizo, preterpasis kambiobankejon kaj estis tre mirigita, ekvidi nenian komercaĵon sed nur viron, kiu skribis. Li deziris ekscii, kion oni tie vendas, eniris la ejon kaj demandis :

— Kion oni vendas ĉi-tie ?

— Azenokapojn, respondis la oficisto.

— Oni povas preskaŭ supozi, rediris la kamparulo, ke la negoco estas vigla, ĉar restadis nur la via.

*
* *

Ŝuisto elpendis novan elpendaĵon kaj miris, kion la preterpasantoj trovis amuzan. Lia elpendaĵo havis jenan skribaĵon : « Ne iru aliloken por esti trompata. Eniru ĉi-tien ! »

(*El Svisa Espero.*)

*
* *

En la lernejo.

— El kio estas faritaj viaj botoj ?

— El ledo.

— Kaj de kio estas prenita la ledo ?

— De bovido.

— Tre bone, tial do diru al mi : kiun beston vi devas danki pro viaj botoj ?

— Mian patron.

*
* *

Enfant terrible.

Patrino (*enirante la ĉambron en momento, kiam la infanoj kisas unu la alian*).

— Tre bone, infanoj, tre gentile! (*al la filo*). Kiam vi estos plenaĝaj, amu same vian fratinton.

— Filo : Ne, patrino, ni ludas ; mi estas la patro kaj ŝi — la guvernistino.

(*El Germana Esperantisto.*)



LAŬROJ

Fabeleto de A. KUPRIN

(El Danubo)

— Plej respektinda publiko, belaj sinjorinoj kaj estimataj sinjoroj !

Mi ankaŭ, se vi permesas, rakontos mian historion, el kiu vi klare vidos, kiom malfirma estas tera beleco kaj kiom facilrompebla kaj forigema estas gloro !

Tiu voĉo eksonis el la profundo mem de vasta kotajujo, kie en acida malbonodora mallumo finputrigadis legomrestoj, terpomŝelo, malbelaj ĉifonoj, ostoj, ŝnuregoj, citronŝeloj, paperetoj, cigaredrestoj kaj fiŝintestoj, kie arigadis rompitaĵoj, boteloj, metalfadeno, ladaj skatolaĉoj kaj malplenaj alumetujoj, kaj kie laŭvole mastrumadis grandegaj brungrizaj ratoj, saĝaj kaj malicaj bestoj, kun nudaj vostoĵoj kaj akraj nigraj okuletoj.

— Permesu, — kiu parolas ? malhumile demandis disŝirita spongo, kiu havis brilan estintecon, pasigitan en tualetejo de bela virino.

— Ĝi estas mi, laŭrofolio, rediris modesta voĉo. Bedaŭrinde, oni min ne vidas, ĉar mi estas surprimita de malnova ŝuo kaj surŝutita de iu rubaĵo. Tamen, se iam la sorto ekvolos eligi min el tiu ĉi profundinterno, mi, certe, opinios mia devo min prezenti al ĉiuj miaj altestimataj najbaroj. Mi estas ĝuinta bonan edukon, mi vivis en granda societo kaj tial mi konas la mondumajn decregulojn.

Do, jen mia historio, estimataj gesinjoroj.

Laŭdevene, mi estas sudano kaj elkreskis sur la suda bordo de Krimeo, en granda verda barelo, zonita per feraj ringegoj. Kvazaŭ tra iu sorĉtuko mi rememoras la ĉielon, la maron ; la montojn kaj la zumadon de cikadoj dum varmegaj noktoj. Mi memoras la bonodoron de glicinioj fluetigantaj siajn blujajn akvofalojn, kaj de etaj blankaj ĉirkaŭvolvigantaj rozoj, odorantaj je violoj, kaj la dolĉan citronaromon de magnolioj, iliajn gigantajn, blankajn florojn, kvazaŭ ĉizitajn el eburo, kaj la luksan, pasian, varman odoron de miloj da trunkokreskaj rozoj, blankaj, flavaj, palaj, rozkoloraj, puncaj, kaj malhel-purpuraj.

Mi estis tiutempe juna kaj malmulte komprenis en la mondaĵoj, same malmulte, kiel centoj da miaj gefratoj,

devenintaj el sama trunko. Unuafoje pri la granda signifo de laŭrofolioj mi eksciis dum sopirplena somervespero, kiam preter ni iris knabino en blanka vesto kaj gimnaziano. En ruĝflavaj haroj de la knabino orebrilis la subiranta suno, kaj la gimnaziano havis malgajan mienon kaj zonon mallevitan ĝis la koksoj, pro kio liaj piedoj ŝajnis ridige mallongaj.

— Rigardu, Nicoĉjo, — ĝi estas ja laŭroj! — ekkriis la knabino ravite. — Efektivaj laŭroj! Tiaj samaj laŭroj, per kiaj oni rekompencadis la poetojn kaj la venkintojn en la olimpaj ludoj, kiaj maldormigadis Miltiadon, per kiaj oni kronis Petrarkon.

Sed la gimnaziano kiel mi eksciis poste, estis enamiĝinta, seniluziiginta, restigita por dua lernoĵaro en la kvara klaso, kaj krom tio li apartenis al la A.A.-partio; t. e. estis terura anarĥiisto. Li forŝiris unu folieton, disfrotis ĝin inter siaj fingroj, ekflaris kaj diris per malafabla basvoĉo:

— Kaj kiajn oni metas en la supon...

Forpasis tri someroj. Mi jam sufiĉe grandigis kaj atingis junulan aĝon, kiam oni transplantis mian arbeton en alian barelon, multe pli vastan, kaj jen unu aŭtunan matenon oni nin envolvis en bastajon, ĉirkaŭligis per bastosnuroj kaj ekspedis norden. Ni veturis en veturilo kaj en vaporŝipo; kaj sur fervojo, kaj denove en veturilo kaj malkaŝdire, ĝi estis malagrablega vojago meze de ĉiama sufokeco, mallumo kaj skuado.

Tiamaniere ni alveturis en ĉi-tiun urbegon, kie pasis tuta mia bruplena kaj diversspeca vivo, kaj kie, je la fino de miaj tagoj, mi havas nun la altan honoron paroli kun tia eminentularo.

Oni nin lokigis en vintra ĝardeno de granda, luksa, palacosimila domo. Super ni estis vitra tegmento, kaj la suda muro de la varmejo ankaŭ konsistis el vitraj kadroj; sed arta herbejo, mallargaj vojetoj, surŝutitaj per sablo, kaj fontano super baseno el poreca ŝtono devis rememorigi pri malfalsa naturo.

Kelke da fojoj ĉiujare en la palaco okazadis brilaj baloj. Tiam la laŭroarboj kune kun la palmoj kaj aliaj grandaj kreskaĵoj estis transportataj el la vintra ĝardeno en la ĉambrojn, sur la ŝtuparon kaj eĉ sur la peronon, tendforme kovritan per stria ŝtofo. Kian societon mi estis vidinta tiujn tagojn, kiaj belaj virinoj, dorlotitaj en plej bonaj homaj oranĝerioj, kuretis preter mi supren, sur ŝtupoj, kovritaj per

dika ruĝa tapiŝo, movetante siajn piedetojn en blankaj atlasaj pantofletoj! Kiaj ŝultroj, brakoj, punktoj, perlaĵ ĉirkaŭkoloj sur nudaj koloj! Kiaj ordenrubandoj, steloj, vangharoj, spronoj, uniformoj, frakoj, floroj en butontruoj! Kia admirinda muziko, lumo, parfumodoro!

Kaj ĉi tio estas forpasinta, kiel sonĝo. Unu vintran tagon, kiam neĝis tiel dense-dense kaj per tiom grandaj flokoj, kvazaŭ iu tie supre nenligus tutan sian korespondaron, amasigintan dum mil jaroj, venis laboristoj kaj nin transportis en grandan malplenan ĉambro, en kies mezo, sur nigra altaĵo, en longa arĝenta ĉerko kuis grizhara viro kun fermitaj okuloj kaj pala vizaĝo, ridetanta per saĝa kaj danka rideto. Eniradis kaj eliradis homoj, tre multe da homoj: oni kantis, parolis recitative, ree kantis, kaj la tuta ĉambro tiam plenigadis per blua odora fumo, tra kiu varme flagris kandelflametoj. Kaj estis tre strange vidi, kiel ĉiuj rigardadis la kuŝanton kaj parolis nur pri li kaj kantis nur pri li, kaj li adis kusi, ne malfermante la okulojn kaj kviete ridetante.

Kiam oni estis forportinta lin, kaj la odoro de l' blua fumo ankoraŭ restis en la malplena ĉambro, venis gaj-humoraj viroj en ruĝaj cemizoj kaj surŝmiris per blanka kolorilo la fenestrovitrojn. Kaj min kun miaj fratuloj du laboristoj prenis sur la ŝultrojn kaj portis tra la tuta urbo al flormagazeno. Malgraŭ malvarmo, al mi estis gaje rigardi el-supre kaleŝojn, vagonojn kaj kapojn de mila homamaso.

Tamen en la florvendejo mi restis ne longe. Nin aĉetis iu restoraciisto kaj starigis en sia manĝoĉambrego inter tabloj, en malfidinda kompanio kun artefaritaj palmoj. Malbona estis tiu vivado. Ofte oni forgesis nin akvumi, kaj en nian barelon oni ĉiutage jetadis amason de cigar- kaj cigared-restoj. Je la vesperoj ludis orgeno, grincis violonoj, en la aero pendis haladzo kaj fumo, kaj en vitra akvario staris senmove apenaŭ movetante siajn naĝilojn, grandaj, malhelaj, mortaĉantaj fiŝoj. De tempo al tempo mi aŭdis konatajn frazojn pri Miltiado kaj Petrarko, sed mi nur enuis pro ili. Tempo kaj vivsperto min estis maljunigintaj.

Poste nia mastro ruinigis. Iu aĉetis por ŝuldoj la orgenon, la tablojn, la blankajn buŝtukojn kaj la akvarion. Sed kreskaĵojn la nova posedanto ne ŝatis? Kaj ni ree nin trovis en florvendejo.

Mi ne parolos detale pri tiu nebrila tempo. Mi diros sole, ke ofte oni nin prenadis lue, kaj ornamis per ni jen

vestibloj dum pagaj baloj, jen preĝejoj, jen restoraciojn antaŭtage de l'novjaro aŭ dum edziĝfestenoj. Mi eĉ ne memoras ĉi tion.

Sed foje aŭtune, venis magazenon paro : fraŭlino en netrempebla mantelo kaj ruĝvanga, buklohara, gajhumora kaj bruema studento, en kiu mi rekonis la iaman malgajmienan gimnazianon, samtempulo de mia infaneco. Ili mendis laŭro-kronon kaj por ĝi larĝan ruĝan rubandon kun orlitera : sur unu duono — « al geniulo de la rusa dramarto », sur la alia — « de la lernanta junularo ».

Jes, ĝi estis mia mortkondamno. Samtage oni min fortranĉis de la gepatra trunko kaj ronde kunplektis kun la ceteraj folioj. Kaj vespere homo en ruĝa frako kun orbutonoj traportis nin inter du vicoj da sidantaj personoj, transdonis al alia homo kaj ĉi-tiu transdonis al tria, kiu kliniĝis el-supre por min preni. Tiu tria, hele lumigata, en nigra velura kamizolo, nigraj streĉvestitaj ŝtrumpoj kaj blonda peruko, ridetis feliĉmiene, aspirame, fiere kaj nenature. « Sur la kapon ! Sur la kapon ! » kriis homoj el mallumo, kaj jen el mia supro mi ekvidis multajn centojn da homaj vizaĝoj, kiel malprecizajn palajn makulojn. Sole — makulojn, makulojn, makulojn. Kaj mi ekaŭdis blekkriojn kaj aplaŭdojn de la homamaso, kaj mi konvinkiĝis, ke la frunto, kiun mi altuŝadis, estis malseketa kaj varma. Kaj dumlonge sur mia suba flanko konserviĝadis grasa postsigno de teatra vizaĝkolorilo.

Tiamaniere komenciĝis nia komuna vivado kun tiu razita, altkreska viro, kaj ĝi daŭris multe da jaroj. Ni loĝadis jen en grandaj vastaj hotelĉambroj, jen en subtegmentoj, jen en keloj. Kiam tempe la razita homo perdis egalpezon kaj ŝanceliĝadis, li forprenadis nin de l'najlo, alpremadis al siaj lipoj kaj malsekigadis per larmoj. « Tiu ĉi modesta krono estas la plej bona donaco de dankemaj kaj puraj koroj » — li ekkriadis per bleka voĉo. — « Metu ĝin kun mi en la tombon ». Sed iafoje li kriis al sia servisto : « Forportu al la diablo tiun ĉi balailon, ĵetu ĝin el la fenestro ! » Tamen, fine, li ne permesis nin elĵeti.

Sed..... ĉio pasas kaj ĉio reiĝas en tiu ĉi mondo. Foje nigraj ĉevaloj kun blankaj plumfaskoj sur la kapoj ekveturiĝis mian razitan homon, kuŝantan sub baldakeno en mal-larĝa kesto, al la urba ekstremaĵo. Mi kun la ceteraj kronoj veturis post li en malgranda veturileto, kaj post ni marŝis homamaso. Homoj denove kantis, paroladis, fumigis per la

konata de mi blua fumeto, malsuprenigis la razitan homon en kavon kaj disiris.

Forpasis somero, aŭtuno kaj alvenis vintro. Super la razita homo oni metis marmorplaton kaj konstruis kapeleton. Iu sinjorino nigrevestita vizitadis nin iafoje kaj forviŝadis polvon de la kronoj. La kronoj estis diversaj: el senmort-floretoj kaj el vivantaj floroj, el verda lado kaj el kolorigita teksaĵo. Estis ankaŭ argentaj kronoj, sed ilin oni forportis tuj post kiam la razita homo estis enterigita. Kaj ni adis pendi sur la muroj de la kapeleto, detruigante pro tempo, pro malsekeco.

Foje la nigrevestita sinjorino diris al la tombejgardisto:

— Certe, estas necese forigi kelkajn kronojn. Ili fariĝis tro malbelaj.

Jen ĉi tiun, tiun kaj tiun...

Ja verdire, ni ĉiuj havis ne allogantan aspekton: la koloriloj senkoloriĝis, la floroj velkis, la folioj kuntiriĝis kaj rompiĝis. Samtage la gardisto nin forprenis kaj jetis en malluman, malvarman ejaĉon malantaŭ sia loĝejo, kun ĉiuseca forĵetindaĵo.

Kiom da tempo mi restis tie, mi ne povas diri: eble — unu semajnon, eble — dek jarojn. La tempirado kvazaŭ haltis; kaj mi mem estis preskaŭ malvivulo. Iun tagon ĉe la gardiston venis konata de li brokantisto, kaj oni nin eltiris al Dia taglumo. Trarigardante ĉian maltaŭgaĵon: li prenis en la manojn laŭrokronon, ĝin ekrigardis kun rideto kaj diris:

— Estas nenio... taŭgas eĉ tiu, — ĝi ankoraŭ odoras.

Li disiris la kronon, lavis la foliojn, por havigi al ili freŝan aspekton, kaj forportis en pomalgrandbutikon, kaj dum longa tempo mi kuŝis sur breteto en papersaketo, ĝis kiam iun matenon venis kuiristino el apuda domo.

— Por unu kopeko da pipro, por tri — da bulbo, por unu — da laŭrofolioj.

Grasa ŝvita mano enigis en la paketon kaj jetis min sur pezilon. Post unu horo mi jam hulis en supo; vespere oni min eljetis en malpuran sitelon, kaj la kortisto forportis min en kotajujon. Tie ĉi finiĝis mia longa, ŝanĝoplana vivo, komenciĝinta tiom poezie...

La rakontanto eksilentis kaj poste aldonis kun ekspiro:

— Ĉio pasas en tiu ĉi mondo....

La aŭskultantaro silentis mediteme. Silentis ankaŭ, movetante siajn lipharojn, la brunaj saĝaj ratoj kun nudaj

vostoj. Sole antikva leda bindaĵo, iam vestinta profundpensan libron, diris ediftoŝone :

— Ĉio pasas, tamen nenio perdigas.

Sed malnova ŝuo ekoscedis per tuta sia disŝirita buŝo kaj diris malvigle :

— Nu, vi scias, tio ĉi ne estas konsoliga....

El la rusa lingvo tradukis

D-ro Andreo Plŝer (Tiflis).



TRA LA GAZETARO

INTERNACIA MEDICINO

Kiel oficiala organo de la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio — « Teka » — aperas nun monata scienca tre grava ĵurnalo sub la ĉi-supra titolo. Internacia redaktistaro gvidas la vere modernan ĵurnalon, legindan — en unua loko — ne pro lingvaj intereso, sed pro ĝia enhavo. Precipe la internaciaĵoj en la medicino estos pritraktataj. Tekaj-anoj ricevas la ĵurnalon senpage : aliaj abonoj jare 3 Sm., unu numero 0,300 Sm, specimeno je respond-kupono. « Internacia Medicino » estos treege valora ankaŭ pro la propagando. Tial la eldonejo liveros ĝin al esperantaj grupoj (tamen nur al grupoj) la tutan jaron por nur 1 (unu) Sm. (anstataŭigo de la forsendelspezoj) se ili mendos kaj pagos ĝin dum 15 tagoj post apero de tiu sciigo.

Adreso : Internacia Medicino, Kötzschenbroda-Dresden (Germanujo.)



GAZETOJ RICEVITAJ INTERŜANGE

Bohemujo : Časopis Českých Esperantistů, kun literatura aldono « Legolibro », ofic. org. de centra asocio Bohema Unio Esp. Jare : 3 k. (eksterlande 3 fr. 75). Red. Ed. Kühnl, Praha II., 2023, Dittrichova ul. 7.

Francujo : Lingvo Internacia, monata, en Esp. ; centra organo de la Esperantistoj. Jare : 5 fr. Adm. ĉe Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

La Movado, monata gazeto, Esp. kaj france. Jare : Francujo, 2 fr. ; ekster Francujo, 2 fr. 75. Adm. : 31, boulevard St-Marcel, Paris.

- Le Monde Espérantiste**, monata gazeto, Esp. kaj france. Jare : Francujo, 1 fr. 25; ekster Francujo, 2 fr. Adm. : 3, rue Sophie Germain, Paris.
- Juna Esperantisto**, monata gazeto beletristika por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj. en Esp. Jare : 2 fr. 50. Adm. ĉe Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.
- Tra la Filatello**, monata gazeto de ĉiuj kolektistoj de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. Jare : 2 fr., kun premioj. Adm. : 164, rue Thiers, Troyes.
- La Normanda Stelo**, monata gazeto, Esp. kaj franco. Jare : 2 fr. Adm. : 41, rue de la Vicomté, Rouen.
- Granda-Britujo** : **The British Esperantist**, oficiala monata organo de B. E. A., Esp. kaj angle. Jare : 3 s. (4 fr.). Oni abonas ĉe la sekretario de la B. E. A. : 133-136, High Holborn, London W. C.
- The Esperanto Instructor**, monata gazeto, Esp. kaj angle. Jare : 1 s. 6 d. Oni abonas ĉe Pionira Librejo Esperanta, 135, Sellincourt Road, London S. W.
- La Londona Esperantisto**, trimonata, Esp. kaj angle. Adm. : 2, De-ronda Road, Herne Hill, London S. E.
- Germanujo** : **Germana Esperantisto**, monata organo de la Germ. Esper. Asoc., Esp. kaj germane. Jare : 3 Markoj. Adm. : Möller und Borel, 18-19, Lindenstrasse, Berlin.
- Mitteilungen**, bulteno de la Saksa Esper. Soc. Jare : 1 M. 75. Adm. : Zahngasse 12, Hansahaus, Dresden.
- Internacia Medicino**, ofic. org. de la T. E. K. A. Jare : 3 Sm. Adm. : H. F. Adolf Thalwitzer, Kötzenbroda-Dresden.
- Grekujo** : **Greklingva Esperantisto**, monata, Esp. kaj greke. Jare : 1,20 Sm. Adm. : Samos, Azia Turkujo.
- Holandujo** : **La Holanda Pioniro**, monata. Jare : 1 fr. 80. Adm. : Binnen Bantammerstraat, 11, Amsterdam.
- Internacia Socia Revuo**, monata. Jare : 1,40 Sm. Adm. : J. L. Bruijn, Weimarstraat 225, s' Gravenhage.
- Laborista Esperantisto**, monata organo de la Ĝenerala Haga Esperanta Laborista Klubo. Senpaga por membroj; 0 fr. 60 jare por ne membroj. Adm. : R. Coomans, Falckstraat 175, Hago, Holandujo.
- Hungarujo** : **Gazeto Esperantista**, bulteno en Esp. Adm. : Ferenciek-tere 6, Budapest.
- Katalunlando** : **Kataluna Esperantisto**, mon. Adm. : Gracia, 12, Sabadell.
- Meksikujo** : **Verda Stelo**, monata. Jare : 5 fr. Adm. : D-ro A. Vargas, 3-a del Reloj, numero 12, Mexico, D. F.
- Perujo** : **Antaŭen Esperantistoj!!** monata. Jare : 3 fr. Adm. : Apartado 927, Lima.
- Polujo** : **Pola Esperantisto**, monata gazeto. Kun literatura aldono. Jare : 2,65 Sm. Adm. : Hoza N-ro 40, Varsovio.
- Rumanujo** : **Danubo**, monata organo de la Rumanaj kaj Bulgaraj Esperantistoj, redaktata nur en Esperanto. Jare : por enlandanoj 3 fr. (1,20 Sm.), por eksterlandanoj 3 fr. 50 (1,40 Sm.). Adm. : 5, Strato I. C. Bratianu, Bukarest.
- Rusujo** : **La Ondo de Esperanto**, monata. Jare : 1 rubl. Adm. : Tverskaja 28, Moskvo.
- Svisujo** : **Svisa Espero**, monata. Jare : 2 fr. 50. Adm.-Red. : 6, rue du Vieux-Collège, Genève.
- Usono** : **La Simbolo**, monata. Jare : 2,50 Sm. Adm. : Post Office Box 1020, Tacoma, Washington.



MALKURAĜO

(De SAM.)

*Senton mi ne povas diri,
Mi bedaŭras, estas vero,
Sed kion mi povas fari?
Ne sangigas la naturo!*

*Mi pensis do, ke, skribante,
Facile estus afero.
Ve! Tio estis eraro,
La plumo ankaŭ tremante!*

*Vin vidante, mi imagas,
Ke fine mi ekparolos;
Sed io tuj min tremigas
Kaj al voĉo malutilos.*

*Eble vi tion komprenos,
Kion mi skribi intencis:
Tial vi al mi pardonos,
Ke mi ĝin diri ne povis.*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakŝo kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

“La Delphinine”

De l' DOKTORO FLASSCHOEN.

*La plej efika kuracilo kontraŭ marmalsano,
same kiel kontraŭ fervojmalsaneto.*

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Trovebla ĉe ĉiuj farmaciejoj.

Moustiques ! Moustiques !!

LE MOUSTIKOL

(Déposé)

Supprime **instantanément** les Démangeaisons occasionnées par les piqûres de **MOUSTIQUES, GUÊPES, PUNAISES, PUCES, etc.** — Le flacon : 1 fr. 50.

Vente en Gros : **PIOT & LEMOINE**, 117, rue Vieille-du-Temple, Paris.

Pharmacie des Deux Mondes

A. LÉGER, Pharmacien de 1^{re} classe

2, Rue des Tournelles - Bastille - Rue St-Antoine, 8

PRIX LES PLUS RÉDUITS

Livraison tous les jours dans **PARIS** et en **BANLIEUE** sans augmentation de prix. — Expéditions en **PROVINCE**.

Demander le **Catalogue** accompagné d'un petit manuel de *Médecine* et de *Pharmacie*, envoyé **gratis** et **franco** sur simple demande.

HYGIÈNE de l'INTESTIN


CONSTIPATION



Echantillons gratuits sur demande.

Refuser les contrefaçons comme on refuse la fausse monnaie.

Bien exiger la marque : **Chatel-Guyon Miraton, France.**



Médaille d'Argent

Médaille d'Or

Diplôme d'Honneur

FARINE LAVILLE

FLEUR D'AVOINE LACTÉE

« L'aliment d'avoine convient en tout temps, à tout âge, et à toute sorte de tempéraments. »

LÉMERY

Ancien Doyen de la Faculté de Paris.

La Boîte : fr. 1,50, dans toutes Pharmacies et Herboristeries.

